

# Unu lerneja horo pri Esperanto

## Enkonduko:

Esperanto estas ankoraŭ tro malmulte konata afero. Por ŝanĝi tion estus bone, se lernantoj jam en lernejo aŭdus ion pri Esperanto. Tiel kreiĝis la projekto "Unu lerneja leciono pri Esperanto", kiun survojjigas Klaus Frieze el Hamburgo kun helpo de multaj homoj.

En kunlaboro kun Lu Wunsch-Rolshoven de la asocio EsperantoLand Klaus Frieze eldonis broŝuron por instruado en germanaj lernejoj. La germana titolo estas „Eine Schulstunde über Esperanto“.

La ideo estas, ke ĉiu lernanto estu atentigata pri Esperanto minimume dum unu instruohoro en lernejo; la lernantoj ankaŭ iom eklernu la lingvon. Tio povas okazi ekzemple en anstataŭa instruado, en la fremdlingvaj klasoj, ĉe la instruado de la gepatra lingvo aŭ de historio. Fakte eĉ en matematiko, ĉar la sperto montras, ke Esperanto ofte lernas ĝuste matematikistoj. Ja la lingvo estas regule konstruita kaj ĝi bezonas malpli da lernado ol aliaj lingvoj.

La koncepto, priskribata sur ok paĝoj, ofertas skizojn por du instruohoroj, kiuj taŭgas por la enkonduko de Esperanto, eĉ se la instruisto mem ne konas Esperanton. La Esperanto-klubo de Hamburgo,

kiu ĉi-jare festas sian 111-a jubileon, subtenas tiun projekton. La prezidanto de Esperanto Hamburg,

Jürgen Wulff, aldonis akompanan leteron kun mallonga klarigo.

## Raporto pri la disvastigo de broŝuro

En junio 2015 mi komencis la distribuadon de la broŝuro, kiun mi metis kun la akompana letero en blankan koverton. Mi ne dissendis la broŝuron per poŝto, ĉar mi timis, ke verŝajne la plimulto estus forĵetita tuj post alveno. Mi volis nur persone donaci la broŝuron plejeble al lernejestro kaptante la okazon rekte varbi por la broŝuro kaj kompreneble ankaŭ por Esperanto.

## 29 lernejoj vizititaj

Dum nur du semajnoj en junio mi bicikle atingis 29, do preskaŭ ĉiujn lernejojn en mia urbokvartalo „Hamburg-Bergedorf“. Nur en unu gimnazio mi ne havis sukceson. La sekretariino postulis antaŭan

avizon ĉar alikaze neniu havus tempon akcepti mian koverton. Do, mi tuj skribis retmesaĝon al la lernejestro kaj ĝojis, ke li tre rapide respondis. Sed bedaŭrinde li esperigis min nur pri la venonta lerneja jaro.

## Ĉu veni sen antaŭanonco?

Mi devas rimarki, ke normale ne estas kutimo kontakti iun en lernejo sen avizo. Kompreneble ĉiu instruisto kaj speciale la lernejestro estas tro okupita por eĉ intertempe aŭskulti klarigojn de iu stranga Esperantisto. Sed feliĉe mi mem ja estas instruisto, kvankam nun pensiulo. Tial mi riskis se-

nhonte eniri la sekretariejojn. Tie mi rapide prezentis min kaj ĝentile petis kontakti iun kolegon de la lernejstra teamo. Kelkfoje mi tuj rimarkis, ke mi aperis en malbona situacio ĉar nur ĥaoso regis la kampon. Unu sekretariino bone komprenigis tian situacion per la bildo „Hodiaŭ urso furiozas!“

Sed 20 foje mi sukcese kontaktis membron de la lernejestraro sen antaŭa avizo. Se ne eblis, mi do-

nis mian koverton al la sekretariino. Mi rakontis, ke la Esperanto-Klubo en Hamburgo nun festas sian 111-an jubileon kaj pro tio mi volas transdoni etan broŝuron kun akompana letero. Kelkfoje jam nun estis la ŝanco paroli iomete pri Esperanto kaj plejofte la adresatoj estis tre malfermitaj kaj ĝentilaj, speciale se mi bonŝance alvenis dum trankvila tempo, kiu ankaŭ en lernejoj troveblas. Sedtia situacio bedaŭrinde ne estas planebla.

### **Matenaj kaj posttagmezaj vizitoj**

Kelkfoje estis bona ideo alveni en baza lernejo tuj post la oka horo (en Germanio kutime la instruhoroj komenciĝas je la oka). Ofte ĝuste tiumomente ne estis tro multe da vigleco, la lernejestro ankoraŭ estis en sia ĉambro kaj la sekretariino rekte gvidis min tien. Sed ankaŭ momentoj kun multe da maltrankvilo povis esti sukcesaj. Neniu sciis pri la restadejo de iu membro de la lernejestraro. Tiam mi vagis tra la koridoroj kaj helpemaj kolegoj alparolis min. Poste mi estis prezentata al la lernejestro, kiu hazarde preteriris per varmega kafotaso en sia mano. Eĉ en la fino de la instrutago mi trovis favorajn ŝancojn. La plejmulto de la kolegaro jam ne plu estis en la lernejo, sed ie iu ankoraŭ sidis antaŭ sia komputilo. Li ne povis ĝui sian laborfinon ĉar la komputilo antaŭe devas esti bonorde

adiaŭata. Ĝuste en tia momento mi aperis! Mi ĝentile pardonpetis kaj riskis lanĉi mian demandon.

adiaŭata. Ĝuste en tia momento mi aperis! Mi ĝentile pardonpetis kaj riskis lanĉi mian demandon.

### **Plejparte bonvolema akcepto**

Tre ofte la alparolotoj bonvoleme akceptis mian etan projekton. Du lernejestrinoj spontane demandis, ĉu mi pretas gvidi regulan kurson dum posttagmezoj. Honeste dirite mi iomete retenis min, ĉar tio dependas ja de la distanco inter la lernejo kaj mia loĝdomo. Sed ĉiam mi povis promesi gvidi kelkajn unuopajn instruhorojn, se tio estus dezirata. Unu lernejestrino tuj fiksis unu tagon en aŭgusto, kiam mi povos enkonduki Esperanton dum tri instruhoroj en tri diversaj klasoj. Normale tiutempe estas la someraj ferioj, sed tiu lernejo ofertas prizorgadon de la infanoj, kiuj ne povas forvojaĝi, ĉar la gepatroj devas labori. Estas mia impresoj, ke speciale en lernejoj kun tuttaga instruado vere kuŝas ŝanco por ni Esperantistoj! En unu lernejo oni rakontis al mi pri instruhoroj, kiuj estis ofertataj per la turka ambasadejo, kiu volas subteni la lernadon de la turka lingvo kaj la lernejo estis tre dankema.

### **111 vizitoj de lernejoj en Hamburgo**

En decembro 2015 / Januaro 2016 mi ĉesis viziti lernejojn por transdoni miajn broŝurojn. Entute mi sukcese atingis 111 lernejojn. La nombro 111 gravis, ĉar nia Esperanto-klubo Hamburg ja festis sian

111-a jubileon. Kompreneble mi stokis kelkajn broŝurojn en mia dorsosako. Pro tiu mi ĉiam havas broŝuron por gekolego, kiun mi hazarde renkontas surstrate aŭ en la metroo. Per interreto mi informis kiel eble plej multajn samideanojn. Intertempe ekzistas kelkaj forumoj kaj eĉ peticioj, kiuj ankaŭ traktas la temon „Unu lerneja horo pri Esperanto“. La broŝuron mi mem tradukis en Esperanton

kaj ricevis diversajn novajn tradukojn. Vizitu mian paĝaron [esperanto-klaus.de]. Tie vi povas elŝuti la materialojn.

Por antaŭlernejo kaj infanĝardenoj mi faris novan broŝuron, bone adaptita al la aĝo de la infanoj. Tiu broŝuro estas nun ankaŭ legebla en diversaj lingvoj.

Klaus Friese

Majo 2020

friese[at]esperanto-hamburg.de